## LA VERDA STACIO PAROLAS.

Post pli ol dumonata somera paŭzo alpaŝas la radiostacio (Radiojournal) de Brno, ricevinta de siaj aŭskultantoj la honoran titolon de „Verda stacio“, al nova laboro. Okaze de la esperanta horeto la 3an de oktobro, prelegis direktoro de Radiojournal, samideano inĝ. Antonín Slavík, jenan deklaracion:

*„Karaj samideanoj en tula Eŭropo,*

*komencante la hodiaŭan esperantan horeton, mi volas antaŭ ĉio saluti ĉiujn niajn amikojn, kiuj kutimiĝis elserĉadi la ĉehoslovakajn radioondojn, je kiuj elsendas la radio-stacio de Brno, la Verda stacio, sian esperantan programon, sed same kore mi bonvenigas tiujn, kiuj la unuan fojon konatiĝas kun ni. Mi petas ambaŭ same, ke ili ankaŭ nunjare dediĉu sian atenton al ni kaj ni promesas tuj de komence, ke ni per ĉiuj niaj fortoj provos ne trompi vian esperon. Ni estas konsciaj pri tio, ke la tasko, kiun ni surprenas per la elsendado de la esperantaj horetoj ne estas facila, ĉar ni bone scias, kiel multnomhra kaj varia estas la komunumo de niaj aŭskultantoj. Kaj ĉi tie mi preferus diri familio ol komunumo, ĉar el la multnombraj tre sinceraj, do ankaŭ kritikantaj leteroj ni eksciis, ke ĉiuj aŭskultantoj vere sincere ligiĝis al nia entreprenado kaj ke ili klopodas per bone opiniataj konsiloj kaj deziroj levi la nivelon de nia esperanto-programo. Kaj tial ni petas tuj antaŭ la unua horeto: ne ĉesu skribi al ni kaj eldiru vian opinion kaj deziron tiel sincere kiel antaŭe.*

*La esperantaj horetoj estos envicigataj en la programon de la ĉeĥoslovakaj stacioj ĉiam la saman tempon, nome ĉiun unuan merkredon de la monato je la 22.15 MET. Ili enhavos regule mallongan paroladon de iu eminenta pensulo, akcentante la tut-homarajn kulturideojn kaj poste artista programo literatura kaj muzika. Por la unua jaro ni precipe preparis en tiu ĉi artista programvico aron da ĉeĥoslovakaj kaj ankaŭ la alilingvaj aŭtoroj. Ni provos prezenti ankaŭ kompletan scenon el la opero „La vendita fianĉino" de Bedrich Smetana. Sed ni prefere ne promesos, por ne malpliigi nian programon pri ĝia efiko.*

*Ni ankoraŭfoje bonvenigas vin ĉiujn kaj ni ĝojas, ke dum la jaro prezentos sin al ni okazo por reciproke atesti al ni, kian eĥon trovis niaj esperantaj horetoj. Ni komencas nian hodiaŭan programon kun la deziro de hona aŭdado eĉ al la plej malproksimaj amikoj.“*

Krom la horetoj, menciilaj en la deklaracio, elsendas Brno (325.4 m - 32 kW) samtempe kun Praha II (249.2 m - 5 kW), Košice (259.1 m - 11.2 kW) kaj Moravská Ostrava (269.5 m - 2.6 kW) ĉiumarde kaj ĉiuvendrede de la 19.15 ĝis la 19.30 MET esperanto-kurson por komencantoj.

Kiel pluan novaĵon ni sciigas, ke valoraj paroladoj de eminenlaj scienculoj estos libre eldonitaj en esperanta traduko, tiel ke ili povos fariĝi posedaĵo de ĉiu samideano kaj pliriĉigi je tre valora verko lian bibliotekon.

Niaj aŭskultantoj vidas, ke Radiojournal Brno preparas por ili multan agrablan programon, sed ĝi atendas ankaŭ, ke la sam-anoj subtenos ĝin en ĝia laboro, ke ili diskonigos ĝian programon kaj instigos al aŭskultado, ke la elsendado trovu multajn atendantajn orelojn kaj ne perdiĝu seneĥe. Kaj nun ankoraŭ la programo de nia venonta horeto, elsendota la 7an de novembro de la 22.15 MET per ĉiuj ĉeĥoslovakaj stacioj:

1. Dr. Jaroslav Kallab, prof. de la Masaryk-universitato en Brno: I d e o j  d e  p a c o . 2. L e t e r k e s t o de Jiří V. Šamla. 3. Bedřich Smetana: S o l e n a  u v e r t u r o . 4. F. K. Zeman: D u  v o ĉ o j . Radioludo en kelkaj bildoj. Personoj: Oficistino de telefoncentralo. Sekretario de vojaĝoficejo. Ludas anoj de TRAKT. 5. Břetislav Bakala: N a c i a j  k a n t o j ĉ e ĥ o s l o v a k a j . Kantas Moravia ĥorkvarteto.

Nepre ne forgesu aŭskulti tiun ĉi tre valoran kaj interesan elsendon. Konigu tion al viaj samideanoj kaj al gazetoj kun kiuj vi kunlaboras. Ĝis reaŭdo!  Jiří V. Šamla.

*Ligilo, 1934, p. 81-82*